- 4 -05- 1992

# Informilo

Revuo de la aktivuloj de FEL - 12a j. n-ro 3, apr. 1992

## Estraro

*Prezidanto:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Membroj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Pieter Vets, Wapenhaghestraat 19, 2600 Berchem. Tlf (03) 239 73 67.

Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

## Komisiitoj (provizora listo)

*Financoj:* Roland Rotsaert kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* William Auld, Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

Ĉu vi jam plenigis kaj resendis la enketilon kiu aperas
en la antaŭa numero de *Informilo*?
Estas por ni tre grave koni VIAN opinion pri la imago de FEL!

# 1 FEL-estraro: 1992 03 21

## 1.1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Roland Rotsaert kaj Paul Peeraerts. RR kaj PP ĉefe traktas la provizoran buĝeton de 1992. Krome la komisiono sugestas aĉeti arigmaŝinon por plirapidigi la pretigon de la revuoj, kaj modemon por plirapidigi la kontaktojn kun la redaktoroj.

## 1.2 Pleno

Ĉeestas: Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Paul Peeraerts kaj Alex Humet. Petis senkulpigon Jean Pierre Allewaert. Pro tio protokolas PP.

### 1.2.1 Houthalen

Stariĝis la grupo de Houthalen. Ili havos krediton ĉe FEL de 6000 frankoj. Momente ili havas 15 membrojn.

### 1.2.2 Eksiĝo Ivo Durwael

Iom subite Ivo Durwael decidis provizore eksiĝi el la estraro de FEL, por lasi liberan aliron al pli junaj homoj. ID eble pretos iĝi komisiito pri la Esperanto-domo. Li daŭre pretas okupiĝi pri la gvidado de Geert Vanhecke.

### 1.2.3 Kooptitaj administrantoj

Laŭ la interna regularo la estraro devas proponi kooptitajn administrantojn por la venonta oficperiodo. Ĝi proponas Roland Rotsaert, Alex Humet, Jos Vandebergh kaj Jean Pierre Allewaert.

### 1.2.4 Batos

JV iros al Batos por kontakti la lokajn esperantistojn, la 18an de julio.

### 1.2.5 Spezokonto kaj bilanco

La estraro funde priparolas la spezokonton kaj la bilancon, tian kia ĝi estos prezentita posttagmeze al la ĝenerala kunveno.



### 1.2.6 Venonta estrarkunsido

Ĝi okazos la 24an de aprilo en la sidejo. Je la 17a horo financa komisiono; je la 18a.10 pleno. PP mendos manĝon. Tiuj kiuj ne povas veni avertu antaŭ la 23a de aprilo je la 12a horo!

# 2 Ĝenerala jarkunsido

Senkulpigon petas Jules Verstraeten.

## 2.1 Protokolanto

Kiel protokolanto estas indikita Jean Pierre Allewaert[1].

APE-KGE

**KARLOREĜA RENKONTIĜO**

**DIMANĈON 28/06/92**

11 h 00 : AKCEPTO EN LA RESTORACIO
INTERKONATIĜA BABILADO - LIBROSERVO
11 h 30 : HONORVINO
12 h 30 : KOMUNA TAGMANĜO MUZIKA ETOSO
14 h 00 : PROMENADO INTER FLOROJ KAJ VERDAJ
PLANTOJ (Bredado de plantoj en vitrodomoj)
16 h 00 : DOLĈAĴO KUN KAFO
16 h 30 : KUNVENO DE LA AKTIVULOJ

**RESTORACIO** : "L'ORCHIDÉE" (L'ORKIDEO)
Rue Jules Destrée 101, 6043 Ransart Appaumée
Tél. (071) 37 00 96

[1] Tuj post la jarkunsido Jean Pierre Allewaert malsaniĝis. Pro tio la nuna protokolo estas farita de Paul Peeraerts, parte surbaze de notoj, parte surbaze de lia memoro...

## 2.2 Financa raporto

### 2.2.1 Spezokonto 1991

| | | | |
|---|---|---|---|
| | Enspezoj pro membrecoj | 116726 | |
| | minus administrado | -59319 | |
| | subtotalo: | | 57407 |
| | Enspezoj pro Horizontaal | 47015 | |
| | minus kostoj | -300722 | |
| | subtotalo: | | -253707 |
| | Enspezoj pro Informilo | 2304 | |
| | minus kostoj | -23172 | |
| | subtotalo: | | -20868 |
| | Enspezoj pro librovendado | 419259 | |
| | minus libroj aĉetitaj | -245939 | |
| | minus kostoj | -142424 | |
| | subtotalo: | | 30896 |
| | Enspezoj pro eldonado | 554478 | |
| | minus kostoj | -420493 | |
| | subtotalo: | | 133985 |
| | Enspezoj pro kursoj | 116599 | |
| Agado | minus kostoj | -48204 | |
| | subtotalo: | | 68395 |
| | Elspezoj pro varbado | | -86955 |
| | Enspezoj pro grafiko | 3270085 | |
| | minus laboroj | -2538144 | |
| | minus materialoj | -1003837 | |
| | subtotalo: | | -271896 |
| | Enspezoj pro Monato | 2024178 | |
| | minus laboroj | -1308692 | |
| | minus materialoj | -785123 | |
| | subtotalo: | | -69637 |
| | Enspezoj pro La Jaro | 107391 | |
| | minus kostoj | -111480 | |
| | subtotalo: | | -4089 |
| | Enspezoj pro makleroj | | 2531 |
| | Manlibro de la aktivulo | | 1517 |
| | Turisma agado | | -5612 |
| | Gazetara servo | | -42130 |



| | | | |
|---|---|---|---|
| | Salajroj | | -3090187 |
| | Domkostoj | | -574590 |
| | Oficejaj kostoj | | -231767 |
| | Sekretariaj kostoj | | -30686 |
| | Revizoro | | -23000 |
| | Restado kaj reprezentado | | -74208 |
| | Subvencioj | | -123383 |
| | Membrecoj | | -26744 |
| | Manifestacioj | | -103823 |
| | Instrumaterialo | | -74626 |
| | Rento ricevita | 68951 | |
| | minus rento pagita | -75589 | |
| | subtotalo: | | -6638 |
| Aliaj | Afranko entute | | -1209721 |
| | Presmaterialo | | -966054 |
| | Telefono | -48414 | |
| | Telekopiilo | -16270 | |
| | subtotalo: | | -64684 |
| | Vojaĝoj | | -163033 |
| | Deskriboj | | -573277 |
| | Kargoj | | -20389 |
| | Riparoj | | -219739 |
| | Donacoj | | 828155 |
| | Subvencioj | | 894530 |
| | Diversaĵoj | | -10634 |
| | Internaj kontoj | | 6344502 |
| | SALDO DE LA JARO | | 19841 |

## 2.3 Sekretaria raporto

La sekretaria raporto estis verkita de prezidanto Ivo Durwael kaj prezentita de Jos Vandebergh:

Post la ĝojiga novaĵo pri la bona financa rezulto de la centro en Antwerpen, malagrable surprizas la rezultoj de la nunaj subvencidosieroj. Evidentiĝis ke la nombro de pruvitaj aktivechoroj falis per 570. Ĉefa kaŭzo de tiu ĉi falo estas la fakto ke Bruselo malligiĝis de FEL. Ili pasintjare pruvis 240 aktivechorojn. Sed se ni ne konsideras Bruselon, restas malprogreso de 330 horoj. La plimulto de la grupoj tre kon-

sciencplene faris siajn raportojn kaj pruvis siajn aktivecojn. Sed kelkaj sekretarioj montriĝas nekredeble neglektemaj, forgesis mencii kursojn, kiuj komenciĝis en septembro '90 kaj daŭriĝas en '91, sendis faskon sen 1 pruvilo kaj finfine prokrastigis la tuton ĝis 3 semajnoj. Ili ne konscias, ke tiel perdiĝas grandaj sumoj por la Esperanto-komunumo en Flandrio. Ni ne forĵetu monon, kiun ni pene atingis per amaso da volontula laboro.

Ni jes akiris konsiderindan kreskon de la subvencio pri 1990. Sed ĝi riskas fali en ĉi tiu jaro. Menciindas, ke la Ministerio ankaŭ subvenciis reprezentiĝon de FEL en la Universala Kongreso. Cetere ĈIUJ kluboj escepte de Kortrijk iom malprogresis en la nombro da aktivechoroj.

Ĉi sube ni listigas la rezultojn kiuj evidentiĝas el la ricevitaj dosieroj:

| | |
|---|---|
| Aalst | 82 |
| Antwerpen + Lokeren | 210 |
| Brugge | 130 |
| FLEJA | 26 |
| Gent | 128 |
| Halle | 54 |
| Kalmthout | 34 |
| Kortrijk | 364 |
| Leuven | 40 |
| Limburg | 205 |
| Oostende | 117.5 |

La malprogreso de aktivecoj samtempas kun falo de la atento en la amaskomunikiloj. Ni kolektis nur 70 gazeteltranĉajojn (99 en antaŭa jaro) kaj notis 10 radioelsendojn (15). Ankaŭ la nombro de informpetoj en la centro duoniĝis.

Ŝajnas do necese por mobilizi ĉiujn fortojn por pli montri nin eksteren. Ni certas ke la disponigo de po 50 frankoj por ĉiu pruvita aktivechoro multe helpos vin por diskonigi viajn aktivecojn. En la centro, Geert Vanhecke ricevis la komision por speciale flegi la eksterajn rilatojn. Li akiris jam unuajn rezultojn kaj tio certe subtenos ankaŭ viajn agadojn.

Sed ankaŭ en 1991 la centro kampanjis eksteren, i.a. per gazetaraj komunikoj, per dissendo de perpoŝta varbletero al 1860 personoj, per partopreno en la Lingvoborso, en la Alternativa Libroborso kaj en borso por kulturaj asocioj, per kampanjo Horizontaal kaj per serio da informaj prelegoj en diversaj mezlernejoj. Danke al tio la vendoj de Esperanto-Programita, kiuj estis jam altaj en 1990, ankoraŭ kreskis al 117 (93).



Mi ne tedos vin kun detalaj ciferoj, sed la vendoj de informmaterialoj kiel faldfolioj, Esperanto-dokumentoj, afiŝoj ktp. ankaŭ konsiderinde falis, malgraŭ disponigo je duono de la kostoprezo. Ekde nun vi do povos akiri senpagan kvanton, depende de viaj aktivecoj. Nepre eluzu tiun ĉi eblecon!

La eldonaj aktivecoj tute ne regresis. Regule aperis la klubaj revuoj: La Konko, Esperanto 2000, La Pioniro, La Progreso. Esperanto-Panorama ekde 1991 ricevis ne nur novan nomon sed ankaŭ novajn redakto-politikon kaj enhavon. Aŭdiĝas ĝenerala kontento pri tiu adapto.

Monato kaj La Jaro daŭre aperadis lastfoje sub redaktado de Stefan Maul. En 1991 oni devis jam prepari la anstataŭigon de la redaktoro. Pro tempomanko forfalis varbaj kampanjoj kaj la nobro de abonantoj iom malpliiĝis. En la unuaj monatoj de 1992 evidentiĝis ke la problemo tre kontentige solviĝis kaj oni do povas atendi novajn iniciatojn por varbi.

La eldona agado viglis. Eldoniĝis

- Nia fundamento sub Lupeo
- Urd Hadda murdita!
- Meznokto Metropola
- Grammaire ABC de l'Espéranto

Represiĝis "De Propedeutische Waarde van het Esperanto".

En la libroservo vendiĝis por la kapturniga sumo de 1 080 691 fr. Tio tamen estas 200 000 fr malpli ol la antaŭa jaro. La ĉefa kialo estas ke ne eblis ripeti la sukcesan vendon de telekartoj.

El la raporto de Paul Peeraerts vi sendube memoras, ke la kvanto de la grafikaj laboroj konsiderinde kreskis. Surpriza estas ke tio realiĝis kvankam la sumo, enkasigita per laboroj por eksteruloj, iom falis.

Resume do mi konkludas, ke la jaro 1991 havis bonajn elementojn, sed ĝi ne estas unu el la plej brilaj el nia historio. Despli granda estas la defio por igi 1992 sukcesa. Geert Vanhecke entuziasme lanĉis sin en la pligrandigo de la ekstera eĥo, la kluboj ricevas grandajn eblecojn por pligrandigi siajn eksterajn agadojn, fondiĝis nova klubo en Houthalen, disvolviĝas novaj aktivecoj en Peer kaj en Stokkem, Wylleman gvidas

interesan eksperimentan kurson en lernejo, Aalst revligigis siajn varbajn aktivecojn ktp ktp. La aŭguroj estas bonaj!

## 2.4 Elektoj 1992

### 2.4.1 Prezento de la administrantoj

La diversaj grupoj de FEL prezentis siajn administrantojn:

**Aalst** : vakas.

**Antwerpen** : Alex Humet, Pieter Vets, Jan Bovendeerd, Gerd Jacques.

**Bruggo** : vakas.

**Gent** : Katja Lődőr, Ingrid Lievens.

**Halle** : Jan Devillé.

**Kalmthout** : Edward Symoens.

**Knokke** : vakas.

**Kortrijk** : Jan Hanssens, Jean Pierre Allewaert.

**Leuven** : Marc Vanden Bempt, Ghislain Jacobs.

**Limburg** : Peter Berx, Mathieu Habex, Bob Rombout, Jos Vandebergh.

**Oostende** : vakas.

Al tiuj 16 administrantoj aldoniĝas aŭtomate Guido van Damme, kiel redaktoro de Horizontaal, André Ruysschaert, kiel reprezentanto de FLEJA kaj Paul Peeraerts, kiel direktoro de FEL.

Al tiuj la eksiĝanta estraro proponas koopti Roland Rotsaert. La ĉeestantoj proponas aldoni ankoraŭ Jean Pierre Vandendaele, Gilbert Cardoen, Yves Nevelsteen kaj Wim Slootmans.

Post akcepto de la ĉeestantaj membroj, tiuj 24 personoj iĝos la administrantoj de FEL por la oficperiodo 1992. La centro zorgos pri publikigo de iliaj nomoj en la ŝtatgazeto.



### 2.4.2 Elekto de la estraro

Estas elektitaj kiel estraranoj Jos Vandebergh, Roland Rotsaert, Jean Pierre Allewaert, Alex Humet, Pieter Vets kaj Jan Bovendeerd.

### 2.4.3 Elekto de la prezidanto

Nur unu persono kandidatiĝas kiel prezidanto: Alex Humet. La ĉeestantaro unuanime akceptas lin.

# 3 Fleja-Jarkunveno, Eeklo, 1992.04.04

**Ĉe-estantaj:** A. Ruysschaert, E. Van Den Bosch, A. Alberto, W. Slootmans, G. Dedapper, G. Vanhecke, Y. Nevelsteen, J. Vanuytven, P. Vets (protokolanto).

**Senkulpigitaj:** H. De Meyere, R. Lemeire, S. Cottenier, W. Rasschaert, L. Kerremans

## 3.1 Agado inter junio 1991 ĝis nun

Ni daŭre kuneldonas JEN-n kaj KONCIZE-n. La junia FLEJA-semajnfino estis sukcesa kaj rezultis en financa gajno (v. financa raporto). La gastronomia SF de novembro finis la kontojn egale rompitajn. Ni ne kiel grupo partoprenis la zonon (De Gordel) ĉi-jare pro eksterhomaj kaŭzoj. Jes estis multaj individuaj partoprenoj al UK, IJF, IJK, IS, Skolta tendaro en Pollando, ktp.

Ankaŭ estas LLK-konto ĉe FLEJA por eŭropaj partoprenantoj al la IJK en Kanado.

## 3.2 Financa raporto

Prokrastita pro manko de donitaĵoj, la kasisto prizorgos plie, helpe de aliaj.

## 3.3 FLEJA-semajnfino de la 26a ĝis la 28a de junio 1992

La ejo jam estas luita. Aliĝiloj esti/a/os distribuitaj dum IS, NEJ-SF, al esperanto-gazetaro, al ĉiuj lokaj grupoj en Flandrio, al individuoj, sisteme per internacia komputila reto, ktp.

### Programo

*vendredon, la 26an de junio 1992*

ĝis la 21a: alveno kaj manĝo
poste: Prelego de Alex Humet pri "Gaia, la tero kiel viva estaĵo"
pli poste : ĝenerala umado

*sabaton, la 27an de junio 1992*

- matenmanĝo
- biciklado: biciklado + pikniko (200 fr), la bicikloj estas surloke lueblaj (200 fr.) sed antaŭe mendendaj
- kradrostado inkl. vino (500 fr./ infanoj ĝis 12 250), vegetaranoj konigu sin
  Muziko (gitara kaj piana) prizorgota kiel etosa fono de YN, Jorg kaj GD

Eble okazos kvizo kaj daŭre estos libroservo
Paralela programo estas antaŭvidita okaze de tondroŝtormo.

*dimanĉon, la 28an de junio 1992*

- matenmanĝo
- paralele okazos prelego de Angelos, popoldancado gvidata de Jan, diskutmateno gvidata de Yves
- je la 13a : tagmanĝo
- poste : aŭkcio



Aliĝado eblas ĝis la 15 de junio kaj estas pagenda en poŝtĉekkonton de FLEJA: 000-0035520-18

## 3.4 Diversaĵoj

- Speciala FLEJA-rabato de 100 fr. estos donita al ĉiuj ties anoj por la Genta aranĝo de la 5a de septembro por instigi la junulojn.

- SC publikigos ĉion.

- Ĉi-jare vere okazos kunlaboro inter FLEJA kaj Servo Civila Internacia, nome laborkampo kun 5 flandraj kaj 5 valonaj junuloj fine de aŭgusto.

- PV instigis ĉiujn FLEJA-anojn helpi la kreadon de imago por FEL, i.a. disdonante la lastan informilon

- FLEJA-skatolo: ĉiu kiu havas malnovajn ludilojn aŭ amuzilojn, kunportu ilin al venonta FLEJA-aranĝo.

- FLEJA ankaŭ povas uzi imagon kaj ni cerbumis pri tio.(rigardu poste)

- Oni devas listigi ĉiujn taskojn por ĉiu funkcio, por ke ekestu proceduroj por estontaj funkciuloj

## 3.5 Senŝarĝo malnova estraro kaj elekto de nova

**Prezidanto** Stefaan Cottenier

**Kasisto** Eddy Van Den Bosch

**Sekretario** Pieter Vets

**Vic-prezidanto** vaka

**Estrarano** Wim Slootmans

**Estrarano** An Alberto

**Estrarano** Yves Nevelsteen

Pro la fakto ke la kasisto restas, publikigo ne vere necesas. La membrarnombro devas esti metita ĉe juĝejo kaj la kontoj kaj bilanco de revizoro kontrolita.

## 3.6 Elekto de TEJO-komitatanoj A

Stefaan Cottenier kaj Pieter Vets

### Notoj de la sekretario

1. Mi (FLEJA) regule ricevas informilojn pri diversaj internaciaj aranĝoj por junuloj. Se vi volas ke mi kopiu kaj sendu tiujn al vi, bv. peti tion de mi per letereto. En tiu provu mencii pri kiaj aranĝoj precipe vi interesiĝas (nur eŭropo, nur dum lernejaj ferioj, ktp).
2. Korespondpetojn mi estontece respondos per preta memorigilo pri KORESPONDA SERVO MONDSKALA kaj donos ties adreson, krom se iu el la FLEJA-anoj intencas mem aranĝi flandran korespondan servon.

### Cerbumado cele al imago por FLEJA

Ni ne cerbumis jam pri solvoj, sed jes pri farendaĵoj, celoj kiujn FLEJA intencos plenumi baldaŭ.

1. propagandi
2. monon gajni
3. grandigi membraron
4. altigi la nombron da aktivuloj
5. pliigi la rektajn kontaktojn (kun novuloj, grupoj kaj estraro)
6. junigi la movadon
7. okazigi aranĝojn tuj post kursoj
8. okazigi kursojn
9. sisteme malfermi esperantujon, kontaktoj kun aliaj asocioj
10. altigi la nombron da instruistoj
11. starigi kontaktojn kun junularaj gazetoj



12. starigi kontaktojn kun junularaj kluboj: bankoj, CJP,...
13. kunlaboro kun Bruselo, Nederlando, Valonio, Germanio, Francio,...
14. starigi laborgrupojn, ekz. pri gazetara agado
15. forigi la familian membrecon
16. pli de malfermeco
17. uzi teknikojn el la scienco de la rekta merkatado
18. okazigi studotagojn celante la enkondukon de novuloj
19. enkonduki la merkatadan ideon ĉe la gemembroj
20. pristudi kaj diskuti la elekton inter aktiviĝo kaj disvastigo
21. ĉe-esto ĉe grandaj publikaj eventoj (junularaj), ekz. Torhout-Werchter,...
22. sistema informiĝo inter la gemembroj

Ni ne kapablas atingi ĉiujn, sed jes kelkajn. Kiuj laŭ vi estas la plej gravaj. Elektu 10 kaj metu ilin laŭvice, nome tiu kiun vi metas unue vi konsideras la plej gravan, ktp.

MI ESPERAS KE ĈIU FLEJA-ANO KUNLABORAS KAJ SENDAS SIAN PREFERATAN LISTON AL: Pieter Vets, Wapenhaghestraat 19, 2600 Berchem.

Preparkunveno pri la FLEJA-semajnfino
okazos la 6an de junio ĉe AA je la 11a.
Memorigi Alex pri la prelego
Memorigi YN, Jorg, GD, Angelos, Jan pri iliaj taskoj.

Ni serĉas ankoraŭ rendevuejon apud Bruselo por kune ekpromeni en "De Gordel".
Se iu scias ion, bv. sciigu tion al la sekretario.

# 4 Komunikoj

## 4.1 Service Civil International

Fondaĵo Reĝo Baldueno ja subvencios komunan aranĝon inter SCI kaj Fleja (60,000 [illegible]). Po 5 flandroj kaj valonoj instruiĝos en Esperanto, aŭdos prelegojn pri lingvaj problemoj, pri la valoroj de la SCI-laboro (internaciaj labor-kampoj) kaj certe amuziĝos. Geert Vanhecke estos la gvidanto de Fleja en tiu renkontiĝo. Instruisto prefereble eksterlanda kaj kun salajreto serĉatas.

## 4.2 75 jaroj de la morto de Zamenhof

Je la 14 de aprilo 1917 mortis LLZ. Tiuokaze Geert Vanhecke, nia civil-servanto kiu okupiĝas pri la eksteraj kontaktoj de FEL, sendis informan noton al 6 jurnaloj kaj kelkaj radio- kaj TV- elsendejoj. Jam nova radio Donna la 8an de aprilo elsendis intervjueton kun Geert kiu bone impresis la publikon. Venontnumere de Informilo ni donos ciferojn pri la reagoj.

## 4.3 Special kurso por inform-petintoj

Geert Vanhecke jam kolektis pli ol 70 adresojn de homoj kiuj volas sekvi ian kurson. Ni ofertos al ili rapidan kurson je du niveloj dum kelkaj sabatoj dum la somera periodo. Instruistoj serĉatas.

## 4.4 Kurso-materialo por Zairio

André Staes ricevis peton de s-ro Ngangu el Lukala kiu urĝe bezonas instruilojn. André proponis la presadon de la metodo Keefe kiu nun troviĝas en komputila formo. Ni bezonus volontulojn por entajpi la lastan parton de la materialo. Ankaŭ mon-donacoj bonvenas.

## 4.5 Kiu faras kion

Se vi iniciatas aŭ jam realigas ion por Esperanto, bv komuniki tion al ni kiel eble plej rapide. Ni sciigos viajn informojn al aliaj per nia Informilo, kiu eble ŝanĝos sian vizaĝon venontnumere ...



## 4.6 Lingvoborso

Dum la lasta semjnfino de februaro 1992 navigis ŝipa lingvobroso tra 4 belgaj urboj : Lieĝo, Hasselt, Antverpeno kaj Bruselo. Ankaŭ FEL estis reprezentita en Hasselt kaj Antverpeno. Estis deca interesiĝo por Esperanto, sed ja grava por ni estis la ĉeesto de FEL. (GV)

## 4.7 Radio - Kop of Flet

La BRTN-programo "Kop of Flet" de Radio 2 temis i.a. pri Esperanto je la 8a de marto 1992. La programo estis aŭskultata de 800.000 homoj. 16 aŭskultintoj kontaktis FEL por demandi kie, kiel aŭ kiam ili povos lerni Esperanton. El multaj milonoj fariĝas miliono. (GV)

## 4.8 Manifestado

La manifestado por paco kaj toleremo en Bruselo je la 22a de marto estis granda sukceso. Kelkaj esperantistoj de FEL, APE kaj brusela grupo disdonis tie po 3000 flugfoliojn nederlandlingvajn kaj franclingvajn pri la paclingvo. 2 homoj resendis la flugfolion al FEL por demandi pli da informoj pri Esperanto. Espereble ili esperantistiĝos. (GV)

UNIKA EBLECO POR KONATIĜI KUN ESPERANTO-HISTORIO EN PROPRA LANDO :

## BUSA EKSKURSO AL "AMIKEJO"

*La 16-an de majo 1992 la Alsta Esperanto-grupo "La Pioniro" organizas historian viziton al "Amikejo" (iama neŭtrala Moresnet).*

*Neŭtrala Moresneto ? Ĉar multaj neniam aŭdis pri ĉi tiu landeto - kiu tamen ekzistis dum pli ol 100 jaroj ! - sekvas mallonga historia klarigo :*
*... Post la pereo de la Napoleona imperio Nederlando kaj Pruslando ne povis akordiĝi pri la refiksiĝo de iliaj landaj limoj ĉar ambaŭ pretendis la regecon super la Moresneta zinkerca regiono. Sekve fiksiĝis du limoj inter kiuj estiĝis proksimume 340-hektara "nenieslando" : neŭtrala Moresnet, kiu ekde 1815 memstare ekzistis ĝis ĝi (post la pakto de Versailles en 1919) aldoniĝis al la Belga teritorio.*

*Kial "Amikejo" ? Nu, komence de nia jarcento Franco, nomita Le Roi, opiniis : "Neŭtrala lando, geografie (kaj do ekonomie) interese situita ; jen, ideala loko por uzo de la neŭtrala lingvo Esperanto ...", kaj li fondis "Amikejo"-n. Kaj ... efektive, dum certa tempo Esperanto bonege progresis tie ...*

*Kelkaj programeroj : dokumenta filmo pri Moresnet dum la busa veturado ; mallonga skizo de la iama neŭtrala teritorio kaj ĝia Esperanta historio far s-o Schrymecker Mathias ; promeno tra bela pejzaĝo ĝis la idilia "Emmaburg" (1260) ; vizito al la iama kvarlanda punkto.*

*ESPERANTISTOJ KAJ SIMPATIANTOJ NI KORE INVITAS AL MULTNOMBRA PARTOPRENO !*
*Ni antaŭvidas multajn partoprenontojn kiuj apogos nian historian iniciaton. Ĉar ni nur disponas pri unu buso (54 lokoj) ni konsilas rapide agi.*

*__PREZO__ : infanoj - 12j. : 300 BF ; plenkreskuloj : 500 BF.*
*__Aliĝo__ : pere de antaŭpago al konto nr-o 068-0679940-94 de Esperanto-groep Aalst sub mencio "Moresnet", aŭ pere de rekta pago al Alsta Estrarano.*

*__Kolektiĝloko(j)__ : 1.Stacidomplaco de Aalst : forvojaĝo je le 8.00-a precize ; reveno ĉirkaŭ la 21.00-a. (Senpaga parkebleco je la stacidoma parkejo.)*
*2. Antverpeno : kondiĉe ke minimume 10 personoj aliĝos. (Depende de plej taŭga haltejo = Berchem aŭ Borgerhout. Precizaj informoj sekvos.)*

*__Manĝaĵoj__ : laŭvole : propra pikniko aŭ manĝo en loka restoracio.*

*__Info__ : De Wolf Mari-Roza, Hoveniersstr. 92, 9300 Aalst. Tel.053/78.82.69.*



Kadre de la tradicia serĉpromenado de la Genta Esperantogrupo ***La Progreso*** okazos

# *grava aŭkcio*

de

- multaj brokantaj Esperanto-libroj, i.a. diversaj raraĵoj
- malnovegaj Esperanto-revuoj
- kelkaj Esperanto-diskoj
- diversaj aliaj esperantaĵoj

***sabaton, la 6-an de junio, je la 19-a horo***

Estas unika ebleco por komencantoj, progresantoj kaj kolektantoj!

Libroj estos vendotaj ekde 10 frankoj, neniaj kostoj aldoniĝos!
La vendado okazos profite al la speciala kaso por la organizado de la studotago "*Mitoj kaj Faktoj pri Esperanto*".

Se ankaŭ vi havas librojn aŭ aliajn esperantaĵojn por vendi, bv. plej rapide kontakti:

Patrick Haerick
Zilverberklaan 25
9032 Gent
tel. 091/27.02.15

Vi mem rajtas decidi ĉu 25%, 50%, 75% aŭ 100% de la enspezo estos por la menciita kaso.

Pliajn informojn pri la serĉpromenado la 6-an de junio, 14h, donas René Budts, tel. 091/22.37.98.



La Genta Esperantogrupo *La Progreso* invitas al unika

# studotago

## *Mitoj kaj Faktoj pri Esperanto*

Kun prelegoj de la famaj esperantoverkistoj kaj lingvospecialistoj:

| | |
|---|---|
| **Jacques Farjon de l'Agâtinerie** | eksinterpretisto ĉe NATO, Germanio |
| **Pierre Janton** | profesoro ĉe la universitato de Clermont Ferrand, Francio |
| **Claude Piron** | profesoro ĉe la universitato de Genève, Svislando |

Kun debatebleco kaj libroservo.

La studotago okazos **sabaton**, la **5-an de septembro 1992** (9h30 - 17h) en la universitata historia kunvenejo "*Het Pand*" centre de la urbo Gent, Belgio.

La kotizo inkluzivas la tutan programon, la resumojn de la prelegoj, la varman tagmanĝon kaj la trinkaĵojn dum la paŭzoj.

Por aliĝi sufiĉas ĝiri la kotizon al:

*Belgio:*
850 BEF ĝis la 30-a de junio aŭ
950 BEF ĝis la 25-a de aŭgusto:
890-9540390-83
de Esperanto
Zilverberklaan 25
B-9032 Gent

*Nederlando:*
ƒ 47 ĝis la 30-a de junio aŭ
ƒ 52 ĝis la 25-a de aŭgusto:
3935244 (Postbank)
de Désirée Derksen
Van Dijkstraat 7
NL-5715 AT Lierop

Fine de aŭgusto vi ricevos pliajn detalojn. Je la adreso Zilverberklaan 25, 9032 Gent haveblas pli da informoj, tel. 091/27.02.15 de Patrick Haerick.

*Ne maltrafu tiun ĉi eksterordinaran tagon!*

---

*N-ro 0000, aperas dusemajne*

# Eventoj

Redakcia adreso: Budapest, pk. 87. H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso: (+36-1) 1288-258

*Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado* — *marto (1) - '92*

Kara Esperantisto!

Ni scias, ke ankaŭ Vi volas ĝui la avantaĝojn de la Esperanto-movado. Vi volas vojaĝi, volas ĝin utiligi en via profesio, vi volas havi konatojn kaj amikojn dise en la mondo, kaj krome vin interesas, kio okazas en la Esperanta mondo.

Ĝuste en tiuj aferoj helpos al vi la nova revuo *Eventoj*, aperonta ekde marto, kune [illegible]onata de *LINGVO*®-Studio kaj Kultura Esperanto-Asocio. Formato de la gazeto [illegible]as A/4, paĝonombro 8, kaj **ĝi aperas 2-semajne!** La abonkotizo por 1992-a jaro (inter la 1-a de marto kaj 31-a de decembro) estas nur 49 guldenoj!! Eventoj estas redaktata ne nur por la hungara, sed por la internacia publiko, kun internacia enhavo! La nova gazeto havas du karakterojn: unuflanke ĝi raportas pri la aktualaj eventoj de la esperanta-mondo kaj helpas en la praktika kaj laboreja aplikado, aliflanke ĝi transprenas multajn interesajn artikolojn el pli ol 100 aliaj E-revuoj!

**Ankaŭ Vi bezonas *Eventojn*-n!** Vi povas aboni ĝin per la samtempa alsendo de la abonila etikedo kaj de la jara abonkotizo.

***Eventoj* estas utila ankaŭ por Vi, ĉar sen ekzercado forgesiĝas via lingvoscio, kaj vi perdos ankaŭ la elspezitan energion.**

Ni petas vin sendi la abonkuponon rekte al la redakcio, kaj la jaran abonkotizon aŭ al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato (H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario), aŭ perbanke (Banko OTP, Budapest XVIII, LINGVO, konto 218-98189/542-030808-7), aŭ al UEA (kodo: ELLS-S), aŭ al vialanda kotizperanto, se tia ekzistas. Ni dankas al Vi. La gazeton vi ricevos perpoŝte rekte el Hungario. (FEL)

Ni atendas vian abonon.

Szilvási László

915 BEF

[illegible] abonilon sendu al la redakcio, la kotizon (egalvaloro de 49 gld) al iu kotizperanto!

*sendu al: EVENTOJ, 1675 Budapest, pf. 87. Hungario*

**Jes, mi abonas la gazeton *EVENTOJ* por la jaro 1992!**

Nomo de la abonanto: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Preciza poŝta adreso: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . poŝta kodo: . . . . . . . . . . .

La abonprezon de ............... (sumo) mi pagis al : .......................................

Dato: . . . . . . . . . . . . . . . . . . Subskribo: . . . . . . . . . . . . . . .

# 26a INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

**Domo de Konstruistoj, Bratislavo, Slovakio**
**1 – 7 aŭgusto 1992**



## KOMENIO – PIONIRO DE LA PEDAGOGIO

### Konferenca kadrotemo : "Methodus linguarum novissima"

Tio estas la latina titolo de epokfara verko de la famega ĉeĥ-morava filozofo, teologo kaj pedagogo Jan Amos Komenský (latine: Comenius, esperante: Komenio), kiu naskiĝis en 1592 (sekve antaŭ precize kvarcent jaroj) en la sudmoravia urbeto Nivnice. Dum la konferenco kelkaj referantoj skizos la vivon, verkojn kaj pionirajn teoriojn de Komenio, multaj el kiuj restas validaj principoj de la nuntempa pedagogio. Tiuj referantoj estos ne nur ĉeĥoj kaj slovakoj – Komenio estis frua eŭropisto, li flue parolis latine kaj verkis tiulingve; li vivis en pluraj landoj kaj fine mortis en Amsterdamo en 1670.

Kaj niaj konferencaj laboroj ne limiĝos al la pasinteco. Analoge kun la avangardeco de la ideoj de Komenio, kiuj abrupte kontrastis kun la tiutempa eduka praktiko, ni serĉos kaj diskutos la novajn teoriojn, praktikojn kaj helpilojn, kiuj nuntempe avangardas en la fremdlingva instruado, kaj kiuj povus revoluciigi la instruadon de Esperanto. Tion ni esploros ne nur per prelegoj, sed ankaŭ per diskutrondoj kaj forumoj.

*Kadrotemo Esperante: La plej novaj metodoj de la lingvo-instruado.*